

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : SEPTEMBRO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova prop-
aganda teksto pri la lastaj venkoj
de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

IX^a KONGRESO

DE K. E. F.

PROPAGANDAJ GLUMARKOJ

arte desegnitaj, kun belaj alegorioj
pri la historia urbo Girona.

Folioj en 10 koloroj
kun 20 malsamaj markoj
Ĉiu folio kostas 0'40 ptojn.

Vin turnu al S-ro F. Hil

Parque Divisionario, n.^o 7 - GIRONA

ESPERANTO TRIUMFONTA

Ĵurnalo internacia, universala,
sendependa. Aperas regule ĉiuse-
majne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelo-
na kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de
la eldonanto TEO JUNG - Köln-
Horrem (Germanujo).

Ni rekomendas la verkon de

EDMOND PRIVAT

Vivo de Zamenhof

Volumo I

de la

Libraro Bolingbroke-Mudie
eldonata de

BRITA ESPERANTO - ASOCIO

Petu detalojn al K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro : **Jaume Grau Casas**

Nia XIII^a en Praha

Antaŭ kaj Postkongresaj festoj

KELKAJ ENKONDUKAJ VORTOJ

Kiel mi promesis, nun mi verkos la raporton pri niaj sukcesplenaj nunjaraj kongresoj, pri tiuj festoj kies rememoro estos ĉiam tiel agrabla al mi, kiu feliĉe povis ilin ĝui. Mi esperas ke nia kara ĉefredaktoro estos sufiĉe bonvolema kaj ke li pardonos se eble la raporto okupos pli da loko ol li intencis difini por la priskribado de la XIII.^a kaj antaŭaj kaj postaj festoj, sed nur per la scio ke mi libere povos diri ĉion kion mi vidis mi kapablos rakonti la sukcesajn tagojn de niaj kunvenoj.

Ankaŭ al vi, kara leganto, mi petas vian pardonon se la raporto ne estos tiel bona kiel mi deziras kaj vi meritas; mi esperas ke la temo estos sufiĉe interesa al vi kaj tial vi legos kun agrabla mieno kion mi klopodos pri-trakti.

Per ĉi tiuj vortoj mi finas la enkondukon kaj tuj transiras al la temo:

RENDEVUO EN FRANKFURT

Niaj samideanoj el Frankfurto invitis la samideanaron traveturontan ilian urbon halti tie kaj ripozi inter ili antaŭ ol repreni la vojaĝon ĉu al Praha ĉu al Dresden. Mi decidis iri tien kaj akcepti la inviton de la Frank-

furtanoj kaj certe mi ne bedaŭras tion. Kun kelkaj francaj samideanoj mi veturis de Parizo ĝis Frankfurto. Jam en la belega stacidomo atendis nin kelkaj samideanoj kiuj afable nin helpis. Mia kara amiko S-ro Rob. Kreuz, Direktoro de la Esperanta Fako de la Frankfurta Foiro, afable gastigis min ĉe parencoj de sia fianĉino (nun jam edzino) kie oni regaligis min. Akompanataj la eksterlandaj samideanoj de la enurbaj, ni vizitis la belan Frankfurton, vera Park-urbo, kaj sekvantan tagon antaŭ nia forveturo ili aranĝis publikan feston kie ni ankaŭ partoprenis. Krom la Prezidanto de la tiea Grupo kaj S-ro Kreuz, kiuj salutis kaj dankis nian ĉeeston kaj viziton, parolis kelkaj aliaj samideanoj el Nederlando, Francujo, D-ro Privat el Svisujo kaj mi. La festo rapide kaj agrable pasis kaj ni havis la okazon aŭdi belajn pecojn de germana muziko kaj popolajn kantojn. De tie ni iris al la stacidomo kie ni envagioniĝis rekte al Dresdeno.

ANTAŬ-KONGRESO EN DRESDENO

La 28.^{an} de Julio matene ni alvenis en la urbon de nia antaŭ-kongreso. Mirindan ekzemplon de bona organizado donis al ni la kongresa komitato. Ĉe la stacidomo enestis policianoj esperantistaj kiuj solvis al ni ĉiujn demandojn kaj gvidis nin ĝis la Akceptejo, kie nove ni estis surprizataj de la modela organizo. Oni disdonis al ĉiuj la Kongresajn dokumentojn kaj difinis la hotelon kie ni devos loĝi dum nia restado en la bela urbo de nia IV.^a

Posttagmeze okazis komuna tagmanĝo kun bongustaj manĝaĵoj kaj tre malmultekostaj. Je la 5.^a okazis prova instruado al la infanoj kun granda sukceso. Je la 6.^a, meze de granda entuziasmo, oni malfermis la antaŭ-kongreson kaj parolis ĉiuj delegitoj de la diversaj nacioj ĉeestantaj. Ĉiujn paroladojn de la fremdaj gastoj samideano von Frenckel tradukis germanlingven kaj faris spritajn ŝercojn kiuj ridigis la grandnombran ĉeestantaron ne esperantistan. Mi notis la paroladintojn kaj jen la landoj tie reprezentataj: Urugvajo, Aŭstralio, Finnlando, Francujo, Japanujo, Danujo, Nederlando, Norvegujo, Bulgarujo, Svedujo, Ĉeĥoslovakujo (ĉeĥoj kaj germanoj), Svisujo, Anglujo, Katalunujo (en kies nomo mi parolis), oficiala delegito de la Polico en Braunschweig kaj de la libera urbo Dantzig. Nenecese estas diri kiel bonege sukcesis la festo kaj kiel bone ĝi impresis la publikon.

Sekvantan tagon 29.^{an}, matene, akurate je la naŭa ni ŝipe veturis al Pillnitz. Per du bele ornamitaj riversipoj ni faris la vojaĝon ĝis tie kie detale ni vizitis la admirindajn belaĵojn de la reĝa kastelo. En Blasewitz ni tagmanĝis meze de granda bruo kaj entuziasmo, kaŭzitaĵ sendube de la granda varmo kiun ni suferis.

Veŝpere je la 7.^a okazis granda festo finita de internacia kostumbalo. Dum la festo oni kantis, deklamis kaj ludis la burleskajon unuaktan «La Glavo de Damokles» tre lerte prezentitan. La balo daŭris ĝis 2.^a matene kaj tie la fervoraj amantoj de Terpsikoro havis okazon ĝui multege.

La 30^{an} de Julio matene kun bedaŭro ni forlasis Dresdenon, pro la ĝu-plenaj tagoj tie pasitaj, kaj per speciala vagonaro ni veturis al la ĉefa celo de ĉies vojaĝo: Praha.

Adiaŭis la 837 partoprenantojn de la antaŭkongreso la Dresdena samideanaro kiu ne povis akompani nin. Ĉe la stacidomo grupigis ĉiuj kaj ĉie oni nur vidis kisojn, man- kaj brakpremojn... Kiam la vagonaro ekveturis ĉiuj kantis nian himnon kaj mi vidis eĉfali larmojn sur belaj virinaj vizagoj. Kial?...

PRAHA

Posttagmeze ni alvenis Prahon. Ni atingis la urbon de nia XIII^a, la sopiratan ĉefurbon de Ĉeĥoslovakujo kies nomo de antaŭ kelkaj monatoj tiel ofte estis legata sur ĉiuj esperantaj ĵurnaloj.

Ĉe la stacidomo estis instalita la Akceptejo. Post longa atendado mi fine atingis mian vicon kaj oni donis al mi la kongresajn dokumentojn, la programon kaj ceterajn sciigojn pri hoteloj k. t. p.

Nokte ĉe insulo Zofin oni rendevuis. Ĉie amikajn salutojn, gajajn vizaĝojn kaj mienojn oni vidis. Agrable oni babilis ĝis la tempo iri dormi kaj ripozi.

LA KONGRESAJ TAGOJ

31^a Julio. Matene kunsidis la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj Lingva Komitato. Ankaŭ oni elektis la naciajn delegitojn kiuj dum la malferma kunsido parolas al la ĉeestantoj.

Ĉe Smetana Halo je la 3.^a posttagmeze S-ro Isbrücker, prezidanto de la XII.^a en Hago, malfermis la Kongreson kaj tuj oni elektis la honorajn membrojn de la Kongreso kaj ankaŭ la efektivan prezidanton kaj membrojn. Jen la nomoj: Prezidanto, S-ro Kamaryt; Vic-Prezidantoj, S-roj Warden kaj Arnold; Sekretario, S-ro Pitlik; Vic-Sekretariinoj, S-ino Cense kaj F-ino Supičova. S-ro Kamaryt parolas varme kaj entuziasme salutis la gekongresanojn. Kiam li aludis la ĉeeston de S-ino Vidvino Zamenhof la publiko ekstaris kaj emocie akklamis ŝin. Neniam mi memoras esti aŭdinta tiel grandan kaj emocian aplaŭdadon. S-ino Zamenhof, kiu okupis kaŝitan logion, plorante salutis la ĉeestantojn.

Poste parolis ĉeĥe la ministro de Publika Instruado kaj la Urbestro de Praha, ankaŭ kore aplaŭdataj.

S-ro Isbrücker legas la raporton de la K. K. K.

D-ro Privat salutas nome de U. E. A.

S-ro Nitobé (japano) ankaŭ salutas angle ĉar li diras ke kun bedaŭro ne povas paroli nian lingvon. Li estas oficiale sendita de la Ligo de Nacioj kaj diras ke la Ligo interesiĝas tre multe por nia homama movado.

Post mallonga paŭzo salutas la Kongreson la oficialaj delegitoj de la Registraroj kaj la diversnaciaj ĉeestantoj.

Jen la listo:

- S-ro Frans Schoofs, nome de la belga Ministro de Sciencoj kaj Arto.
 » Vilho Setala, » » » finnlanda Ministro de Instruado.
 » Julio Mangada, » » » hispana milita Ministro.
 » Alb. Alessio, » » » itala Ministro de Maraferoj.
 » Sevenhuysen, » » » nederlanda Ministro de financaj, komercaj kaj industriaj aferoj.
 » Fritz Wiegler, » » » saksa Registro.
 » H. Boczkowski, » » » ukraina diplomatio Misio.
 » Fujisaŭa, » » » sekretario de Ligo de Nacioj.
 » Dieterle, » » » saksa Esperanto Instituto.
 » Bzavko Wiegler » » » jugoslava Delegacio.

Poste alparolis al la publiko la naciaj delegitoj laŭ jena ordo: Alĝerio; Belĝujo; Bulgarujo; Ĉeĥoslovakujo (ĉeĥa lingvo kaj germana lingvo); Danujo; Dantzig; Estonio; Finnlando; Francujo; Germanujo; nome de la hebreoj de la tuta mondo; Hispanujo; Hungarujo; Italujo; Japanujo; Jugoslavio (por serboj kaj por kroatoj); Kanado; Litovujo; Nederlando; Norvegujo; Polujo; Rumanujo; Svedujo; Svisujo; Usono; Urugvajo; Aŭstralio; Aŭstrujo; Britujo: angloj, skotoj, kimroj, kaj iroj; Blinduloj; kaj la oficiala reprezentanto de la Frankfurta Foiro.

Poste, meze de granda entuziasmo kaj per la kanto de la Espero oni fermis la kunsidon.

Eble la katalunaj legantoj restos surprizitaj pri tio ke mi ne salutis la Kongreson en ilia nomo kaj en tiu de nia ĉefa organizaĵo «Kataluna Esperantista Federacio», kies prezidento mi estas; sed la spirita nekompreneco de la oficiala reprezentanto de la Hispana registro, S-ro Mangada, malpermesis al mi tion fari, kaj eĉ li minacis fari skandalon se mi intencos paroli en alia nomo ol en tiu de la hispana ŝtato. Post diskutado kaj malkonsento pro tia nekvalifikebla minaco, por esperantismo kaj por eviti malagrablecojn mi rezignis mian volon. Por ne malbeligi tiun ĉi raporton, nenion plu mi aldonos ĉi tie, rilate tiun aferon.

1.^a Augusto: Matene kunsidis U. E. A. Posttagmeze I.^a laborkunsido de la XIII^a. Oni aprobas la starigon de komisiono por ebligi la tutmondan monkoklekton por la tombo al D-ro Zamenhof.

Vespere ni ĉeestis koncerton de ĉeĥaj kantoj kaj muzikoj.

2.^a Augusto: Fakajn kunvenojn oni organizis matene. Mi partoprenis la komercistan kunvenon. Ĝi bone sukcesis kaj espereble oni eliros bonan rezultaton por la komerca enkonduko de nia lingvo.

Posttagmeze vizito al la vidindaĵoj de la bela urbo. Vespere sendube okazis la plej agrabla festo: la internacia kostumbalo. Granda amaso da

ĉiuspecaj kostumoj svarmis tie kaj reen de unu parto al la alia de la granda salono kaj la dancantoj iris de brako al brako; resume, vera fratiga festo.

3.^a *Augusto*: Matene, laborkunsido de la XIII^a. Posttagmeze, kunveno de U. E. A. Vespere mi ĉeestis le teatran prezentadon. Oni ludis «Nokto en Karluv Tyn». La ĉeĥoslovakaj samideanoj petis al la fremdaj gastoj esti bonvolemaj pri ĝi. Nur mi diros ke ĝi ŝajnis al mi iomete naiva. Cetere, la roloj estis ludataj de esperantistaj amatoj.

4.^a *Augusto*: Dum tiu ĉi tago ni ekskursis al la Moravia Kras (stalaktita kaj stalakmita grotaro). Mi ĝojas ke la organiza komitato de la Kongreso organizis tiun ekskurson, ebligante la viziton al tiu grotaro, kiu tre multe impresis min. Pri la organizo de la ekskurso, bedaŭrinde mi devas diri ke ĝi ne estis sufiĉe zorgata. Pro la malbona servo de vagonaroj kaj aŭtomobiloj la ekskurso rezultis iom ĝena, tamen por mi tre bela kaj interesa.

5.^a *Augusto*: Matene laste kunsidis U. E. A. Posttagmeze 3^a kunsido de nia XIII^a. Vespere ĉe Zofin la blindaj esperantistoj ĉeestantaj faris koncerton. Ĝi brile sukcesis precipe kiam ludis la gitaron nia samlandano S-ro Zapater.

6.^a *Augusto*: Matene okazis la ferma kunsido de nia granda Kongreso. Kiam ni pritraktis la aferon elekti la lokon por nia XIV^a la finnaj samideanoj petis por ili la taskon organizi ĝin kaj oni aplaŭde akceptis Helsinki kiel urbon por la XIV^a. Ankaŭ samideano Narita el Japanujo petis la XV^{an} por Tokio kaj oni aplaŭde ankaŭ principe esprimis la konsenton.

Meze de grandega entuziasmo la laboroj de la XIII^a estis finataj per kantado de nia himno.

Vespere mi forvojaĝis al Budapeŝto, kaj vere malĝoje mi lasis la urbon kie dum tuta semajno ni ĝuis veran internacian fratecon.

Entute enskribiĝis 2561 kaj ĉeestis ĉirkaŭ 2300 samideanoj; per tiuj nombroj vi povos imagi la grandecon de la XIII^a.

POSTKONGRESAJ FESTOJ

BUDAPEST: Post bela vojaĝo per ŝipo sur la Danubo, la 8^{an} de Aŭgusto nokte ni alvenis Budapeŝton.

Bone organizatajn ĉarmajn festojn, neforgeseblajn tagojn ni ĝuis en Budapeŝto.

En la safutkunveno de la 9^a de Aŭgusto parolis samideanoj el Anglujo, Belgujo, Aŭstralio, Svedujo, Francujo, Finnlando, Svisujo, Danujo, Italujo, Holando, Germanujo kaj Katalunujo.

Ni vizitis la urbon, ni ĉeestis belegan teatran prezentadon kaj ĉiuspecajn festojn por ni organizatajn.

VIENO: De Budapeŝto ni veturis Vienon kie mi ankoraŭ ĝuis la lastajn tagojn de la esperanto-semajno kiun oni organizis por la esperantistaro traveturanta la urbon post la XIII^a.

Nia ĉeesto estis por la Viena esperantistaro vera kuraĝigilo.

Dankon al ĉiu!!

LASTAJ VORTOJ : Ne priskribeblaj estas la feliĉaj tagoj de niaj brilaj festoj. Neniam mi forgesos la koran akcepton kiun ĉie mi trovis. Kiel lasta konkludo mi diras ke eĉ la plej malvarmaj kaj skeptikaj samideanoj eltiris forton kaj entuziasmon por labori ĝis la fina triumfo, vere ne malproksima.

JOAN GILI NORTA

Rimarko de la Redakcio.—La 13^{an} de Aŭgusto, el Vieno, S-ro Gili Nortia sendis longan kaj detalan raporton pri la XIII^a Kongreso, sed kvankam la sendaĵo estis rekomendata ĝi ne ankoraŭ alvenis ĉe ni. Nia amiko revenis Barcelonon el sia vojaĝo tra Italujo nur je la lastaj tagoj de la monato, kaj, sciiginte pri la ĝena afero, li bonvolis pretigi tiun ĉi novan raporton, nerve kaj rapide verkitan, la 30^{an} de Aŭgusto.

Pro tio oni pardonu ankaŭ ke la nuna numero ne aperis tute akurate la 1^{an} de Septembro, sed kelkajn tagojn poste.

Ni protestas

La netoleremo de S-ro Julio Mangada, Komandanto de la hispana armeo kaj reprezentanto de la hispana registaro en la Praha kongreso, altiris la indignon de la katalunoj kaj estis denova pruvo ke Esperantismo kaj Homaranismo troviĝas nur sur la lipoj de kelkaj samideanoj kaj ne sukcesis eniri en ilian kordon.

Dum la malferma kunsido de la Kongreso, S-ro Mangada prezentis sin al S-ro Gili Nortia, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», dirante: «Mi malpermesas al vi saluti la Kongreson nome de la katalunoj, ĉar mi estas reprezentanto de la hispana registaro kaj nur en la nomo de Hispanujo oni povas paroli tie ĉi». Post tio li minacis «fari skandalon» kaj nur pro la prudento de nia amiko Gili Nortia malagrablaĵo estis evitata al la Kongresanoj.

Pri la prudento kaj esperantisteco de Komandanto Mangada ĉiu ja povos juĝi.

Ni ne volas pritrakti funde la aferon, ĉar ni ne bezonas pruvon ajn pri la rajto de la katalunoj. Sed ni volas rememorigi, ke en la rilatoj inter esperantistoj devas regi nur: *neutraleco* kaj *toleremo*.

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



BALDAŭ alvenos la dato de nia jarfesto kaj necese estas uzi la tempon restantan ankoraŭ por pligrandigi ĝian certan sukceson.

Jam sciigis sian ĉeeston multaj geesperantistoj el ĉiuj lokoj de nia lando kaj eĉ eble ni estos honorigataj per la ĉeesto de iu eksterlanda samideano.

La Kongresa Komitato firme laboras en ĉiuspecaj aranĝoj. Nia nunjara Kongreso estos plej interesa kaj alloga. Ĝi certe estos signo de la renaskiĝo de Esperantismo en tuta Katalunujo!

Por la Ekspozicio ĉiuj bonvolemluloj estas denove petataj sendi tuj siajn esperantaĵojn. Oni plene zorgos pri ili.

En la venonta numero aperos la programo de la Kongreso kun ĉiuj detaloj, hortabelo de la vagonaroj, prezaro de hoteloj, verdikto de la VIII.^aj Internaciaj Floraj Ludoj, bilanco de K. E. F. ĝis Oktobro, proponoj ricevitaj, kaj al ĝi estos aldonata «suplemento kun bildoj de la Kongresurbo».

Ankaŭ oni enmetos en ĝi la fervojan rabatilon kaj la kongresinsignon.

Por ĉiuj prikongresaj aferoj vin turnu al S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario n-ro 7, Girona.

La oficiala alveno de la Kongresanoj en Girona kaj akcepto ĉe la Urbdomo okazos la 15^{an}, sabaton, je la 6.^a vespere.

Dimanĉon matene okazos la laborkunsido, posttagmeze la belega festo de la Floraj Ludoj kaj nokte la oficiala Festeno kun ĉeesto de la aŭtoritatuloj. Landon oni faros du ekskursojn al Castelló d'Empúries kaj al Banyoles.

Por tiuj ĉi ekskursoj, same kiel por la oficiala festeno, estos necesa la antaŭa enskribiĝo.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

LISTO DE RICEVITAJ VERKOJ

35.—La unua paŝo. 36.—Quis fuit, horrendos primus qui protulit enses? Quam ferus et vere ferreus fuit! 37.—Nova metodo. 38.—Pli forta ol la Morto. 39.—Madrigalo. 40.—Kompatinda Lleó. 41.—Ne tentes, ant perface. 42.—Kankro. 43.—Sen la akvo, la Homaro kaj vegetaĵaro ne ekzistus. 44.—Minimus. 45.—Neniam! 46.—La Majo alvenis. 47.—Ha, malbeninda ŝipo! 48.—Pentekost' 49.—Ne fari malbonon estas nia devo. 50.—Pripensu... 51.—Aglo blanka. 52.—Sweet, sweet. sweet... 53.—Nojo. 54.—Infano. 55.—Travivinto. 56.—Andante. 57.—Flugintaj revoj. 58.—En la nom' de Dio. 59.—Bela naiveco. 60.—En sonĝo Patrujon mi vidis. 61.—La naturo ĉarmas la poeton. 62.—Ne ŝovu la nazon... 63.—Kantu kun ĝojego! 64.—Ama malkvieto. 65.—Diada senyalada. 66.—Nunca fuera caballero de damas tan bien servido. 67.—Nia deziro estas... 68.—Sangaj larmoj. 69.—Nur unufoje amas la kor'. 70.—Amo kreas la pacon. 71.—Tradicio ne estas rakonto. 72.—Ruĝa floro. 73.—Homar': vojiru! 74.—En la mondon venis nova sento. 75.—Ironio. 76.—La Devesa. 77.—Katalunujo kaj antaŭen.

36 tagoj en Esperantujo.—Parolado de S-ro Joan Gili Norta, Prez. de K. E. F., pri la XIII.^a Universala Kongreso en Praha kaj vojaĝaj impresoj.

Koncerto de Gitaro,—de S-ro B. Zapater, blinda samideano el Barcelono, loĝanta en Germanujo, kiu, okaze de sia restado en nia urbo, afable akceptis dediĉi al la esperantistaro elmontron de sia arto. Post la koncerto oni faros monkoklekton por la revuo por blinduloj «Esperanta Ligilo».

15 Septembro 1921, je la 10^a vespere en la sidejo de K. E. F.

L' edzin' parolas

Kiam senaŭde, kion mi aldiras
aŭskultas vi, vagante per rigard';
kiam via spirito ekvojjiras
foriĝante de mi laŭ vent-hazard',

mi vidas, ke ŝip-penso vin enporta
veturas jam de horizont' ĉe l' fin:
estas puŝo de am' sufiĉe forta
por konduki min tien apud vin.

Apud vi mi veturas ensorĉita,
alpuŝata de mia am-fervor';
mi nur scias, sur vojo nekonita,
ke mi estas l' edzino enamita,
kiu kune kun vi veturas for.

La Poeto

Sed nur vi—gvidantino, nur vi—forta,
ĉar ĉiam, en kviet' aŭ furioz',
vi scias, ke ŝip-penso min enporta
al via am' revenos por ripoz'.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP GRAU CASAS

Terurigo



VOJIRANTE al kampdomo de la Selva, kie restadis mia familio, mi malfruis pro nenecese rakontotaj kaŭzoj. La suno estis malalta kiam mi alvenis ĉe la muelejo de l'Ulmo, tri horojn ankoraŭ malproksima de la fino de mia vojaĝo; sed malgraŭ la malfruo, mi devis halti por trinki kaj mi sidigis sur ŝtono apud la rivero por ripozi momenton, fumante cigaredon. La muelejo de l'Ulmo ne laboras jam de antaŭ multaj jaroj. Ĝi estas nelogata domego aŭ pli bone nelogebla ruino, ĉar granda parto el ĝiaj muroj falis kaj ĝiaj tegmentoj kaj plafonoj staras nur parte. Interne kreskas monta arbustaro kaj la sovaĝvito elmontras sian foliaron tra la fenestroj. La kluzo submovita kaj gratita lasas kun maŝato libere flui la murmurantajn akvojn. La granda turbino putriĝas senmova sur la seka kanalo kie la araneoj ĝin plenigas per teksaj retoj kaj la dornarbustaro de la ŝtonmuroj superŝutas ĝin per vergetoj kaj sekfoliaro. Kaj pensinte ke en aliaj tempoj tiu rado donis movon al komplikita maŝinaro kaj imaginte la ronkojn de la muelŝtonoj, rimenoj kaj dentradoj, la irvenojn de la muelistoj, la vicon de ĉaroj kiuj certe amasiĝis en la kortoj, la sonadon de la tintiloj, la klakojn de la vipoj kaj la kriojn de la ĉaristoj vivplenigantajn la tutan valon, oni rajtas almenaŭ sin plendi pro la disfalo kaj pro la kvieto nunaj. Nun la regiono estas senhoma kaj arbo-plena. La vojoj herbpleniĝis kaj la radsignoj malaperis. Neniu trairas; nur iu malofte, de tempo al tempo. La suno rigardas tien tagojn post tagoj kaj monatoj ne malkovrante homan figuron kaj la vespero surfalas meze de morta kvieto.

Mallongan tempon mi dediĉis al ripozo. Mi volis profiti laŭeble por mia marŝado la tagan lumon kiu jam ekruĝis. Mi eniris, do, en la arbaron per rapida paŝado; sed baldaŭ mi komprenis ke mi penis senutile ĉar antaŭ ne multe la nokto min atingus en plena arbaro. Certe la suno devis esti jam subirinta. Malgraŭ la altega betularo kiu okcidente kaŝis al mi la vidaĵon, la duonheloj, kiuj sin filtrante tra la maldensaĵoj de la foliaro dismakulis la arbaron, sufiĉe montris per siaj koloro kaj malforteco la staton de la fajrujo de kie devenis. Ili estis perdintaj sian oran brilon; ili ruĝis, palpebrumis, ne povis daŭri. Subite sin etendis kvazaŭ ombra ondo kaj ili estingiĝis ĉie.—Adiaŭ, bonfaranta krepuska rigardo; ĉi ne plu min akompanos—mi ekkriis. Sed mi eraris. La morta taga flamo reviviĝis ankoraŭ kaj ĝiaj reflektoj ree disvastiĝis sur la montaro; kaj malfortaj, violkoloraj, ondantaj kiel lumaj fumvualoj, ili vagis de loko al loko; ili estingiĝis, reaparis kaj denove malaperis multe da fojoj, tiom ke mi perdis la fidon revidi ilin nur post longa tempo de vana espero. Fine mi komprenis ke ili ne revenos kaj tiam mia koro premiĝis. Mankis al mi ankoraŭ duhora vojirado tra regiono tute senhoma.

Kiam mi pasis la ponton de la Mustelo, ŝtona ponto mallarĝega kaj nur el unu arkaĵo, tiom simpla ke oni dirus ke ĝi estas la ostro de ripego, la nokto plene regis. Trans la ponto, la arbaro estis impone nigra. Certe timo min kaptis. Sed... pro kio? Ĉu pro rabistoj? mi eĉ ne songis pri ili. Ĉu pro mortfalo? Mi sciis ke mia vojo bordiris nenian abismon. Nu... tio estas senkaŭza timo—mi murmuris—timo pro nenio propra de virinoj kaj infanoj. Estas necese ĝin ne atenti. Filozofio kaj antaŭen! Sed la filozofio kiu antaŭenirigis min ne sukcesis min trankviligi.

Takta flutkanto de bufoj, kiu sonis malproksime en valprofundaĵo, kuraĝigis min pli ol la plej bonaj rezonadoj. Mi metis tutan mian atenton en tiu dormiga kanto kaj dum mi ĝin aŭskultis ŝajnis al mi ke mia soleco ne estis kompleta. Estis estaĵoj kiuj sin movis, kiuj kuniĝis por viva ago, kiuj komunikiĝis kun mi per sia voĉo. Ili iel akompanis.

Lumeto kiu aperis pli poste meze de malklara maso de monto, ankaŭ kunhelpis kuraĝigi min. Tie estis domo kun familio. Mi imagis la kamparaninon kribranta farunon sub la helo de tiu lumeto, la knabojn arangantaj la furagon por la nokto kaj la terlaboristojn, kubute apogitaj sur la preparita tablo, atendantaj la horon de la vespermanĝo. La bonaj homoj havis la fenestron malfermita, ne pensante pri la almozo farata al la vojaĝanto nur permesante al li ekvidi la lokon de ilia restejo. Ne ĉio estis dezerta, ne. Mi sentis la akompanion de tiuj malproksimaj homoj kaj mi ja ne povis dubi pri ilia ekzisto.

Distrita tiele mia imago, mi faris longan vojiron kun ia kuraĝo; sed kiam mi perdis el la okuloj la lumeton, kiam postlasinte vojkurbon mi ne plu aŭdis la bufan flutkanton kaj perceptebla, teruriga silento vibris ĉirkaŭ mi en la senlimo, ŝajnis al mi ke la nokto min surfalis.

Mi haltis konfuzita, plena de ia ĝeno simila al tiu kiun ni foje spertas kiam persono ŝtelire alproksimiĝas malantaŭ ni. Mi volis min turni kaj ne kuraĝis. Fine mi atingis fari tion kaj mi sentis pasi sur mia haŭto malvarman frostotremigan spiron. Sed mi vidis nenion... nur la arbaron, la valprofundaĵojn, la mallumon.

Mi ree marŝis kaj alian fojon estis devigata halti post kelkaj paŝoj. Mi ne povis min liberigi el la trudpenso ke iu min sekvis kaj observis. Korbatante emocie denove mi rigardis, aŭskultis... La silento estis absoluta. Nur la bruo de mia honta spiro kuraĝis ĝin profani. La nokto estis plejnobla, diafana: dubeblua, senlima abismo punktita per steloj kiuj montris konfuzajn distancojn en la nefinebla profundaĵo. Kaj malsupre, la ombra tero restis muta, kun sankta silento, kvazaŭ kolektante kun religia respekto la disradiadojn de la senlimeco. Tio estis kion perceptis la okuloj kaj la oreloj... Sed plie... Kiel esprimi tiun profundan, haŭtotreman senton kiu min persekutis? mi nur sciis kompari mian staton kun tiu de persono sin sentanta ĝenata ĝis surferlimo pro la insista rigardo de alia fikse lin observanta en silento. Mia spirita streĉo iĝis ja neelportebla. Mi ne povis plu rezisti. San-

goglacie mi falis sur la genuojn. Ho senlimo, ho nekonateco, ho sankteco... mi vin adoras! Min helpu, min ŝirmu!—mi ekkriis per nevola krio kiu timige resonis en mia koro. Kaj terbuŝe etendita mi daŭris preĝante, delire preĝadante, kuntiriginta, trema, ĝis kiam min kaptis kormoligo, ploro, konsolo.

Mi min levis fine revigliĝinta, posedita de mistika dolĉeco. La teruro ne tute forlasis min, sed ĝi estis tolerebla. Kun humila teniĝo kaj la palpebroj malaltaj mi daŭrigis la marŝadon tra la solecaj vojetoj, murmurante preĝojn duonlaŭte; kaj tiel mi sukcesis alveni al la kampdomo.

Tie atendis min la familio amplena kaj la fajrujo brulanta. Ĉiuj estis jam antaŭtimantaj pri mi. Ili adresis al mi kelkajn demandojn, kiujn lakone mi respondis. Kaj mi kredis observi ke neniu atentis pri miaj respondoj. Eble tio estis ĉar mi diris seninteresajn aferojn kaj ĉies okuloj malkovradis sur mia vizaĝo ion gravan kaj nedeĉifreblan, kio pli ol miaj vortoj altiris la atenton. Kia honesta honto aŭ spirita embaraso silentigis min pri tio plej grava el mia tagtempo? Mi ne scias. Certe estas ke mi evitis konversaciojn, mi sidigis antaŭ la fajrujo sub preteksto de laciĝo kaj min donis al miaj meditadoj.

Neniam kiel dum tiu nokto mi konis tiun timon pro la senfino, pro la nekonateco, tiun intensan suferon kiun ĉiuj spertis iufoje kaj kiun neniam oni studis kun la dezirata trankvileco. De kio devenas tiu terurigo? Ĉu la soleco, la senlimo kaj la mallumo agas per si mem kun malbonfara influo sur la homaj kapabloj, freneze malordigante ilin? Aŭ ĉu estas ke en tiaj cirkonstancoj vekigas en ni kapablo preskaŭ ĉiam forigita de maldelikataj sentoj, intima sento, kiu permesas al ni ricevi la sugestion de supersentebraj povoj nin perturbantaj kaj frostotremigantaj? Ho mia Dio! kiel dubi pri tiu profunda sento, per kiu mi vin palpis kun sankta teruro meze de la nokta malpleneo? Ĝi estas nepreciza, malklara, kvazaŭ vekiganta sento kiu, se mi ne estus ricevinta aliajn lumojn, povus min porti al adorado de io abomeninda, kiel tiel multajn popolojn, kiuj eble ne havis en religio aliajn majstrojn ol la teruro; sed, eĉ tiel nepreciza kaj malklara, necese estas rekonigi ĝian ekziston.

JOAQUIM RUYRA

El kataluna lingvo tradukis

ESTANISLAU PELLICER



Karakteroj

DIRULOJ KAJ AGULOJ



ARISTOKRATE, solene, alte estas la paroluloj kaj la pensuloj la artistoj de la parolo kaj de la penso, ekzemple Vázquez de Mella kaj Balmes.

Demokrate, silente estas la diruloj kaj la aguloj.

La dirulo ĉiam rakontas projektojn kaj eksterordinarajn okazojn. Plej malgranda propono aŭ okazaĵo ĉe li estas granda projekto aŭ gravaĵo. La tempon li pasigas grandige rakonti malgravaĵojn. Kompreneble tiel li ne havas tempon fari ion gravan. Sed ĉion li gravigas per la diro, ĉion li diras grava. Ju pli li diras, des malpli li agas.

La agulo ne havas tempon diri siajn agojn. Ju pli li agas, des malpli li diras. Li vivas por agi kaj agas por vivi. La agulo kredas je la merito. La dirulo kredas je la ŝanco.

DELFI DALMAU



Bibliografio

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY.—Aŭtoroj: Fleming Fulcher kaj Bernard Long. Eldonistoj: E. Marlborough Co., London. Bonega kaj bele prezentita angla-esperanta vortaro, kun kelkaj klarigaj notoj pri nia lingvo. Aĉetebla ĉe Brita Esperantista Asocio. Prezo: 8 ŝilingoj.

LA KOBOLDO ONDRA.—Aŭtoro: Jiri Mahen. El ĉeĥa lingvo tradukis «Esperantista Rondeto» kaj eldonis «Moraviaj Esperanto-Pioniroj». Tre belaspekta libreto, kun ĉarma rakonto pri la faroj de malbona koboldo Ondra al la fine malfeliĉa knabeto Matiaĉjo. Tiu ĉi traduko, vere ŝatinda kaj graciplena, estas tre dece dediĉata al amantoj de la delikata animo infana.

BULLETÍ DE LA BIBLIOTECA DE CATALUNYA.—N-ro 8. Bulteno de la fama Biblioteko de Katalunujo, lukse presita, kun plej interesa enhavo kaj

multnombraj gravuraĵoj. Artikoloj aparte citindaj pri la Barcelonaj prelistoj dum la XVI^a jarcento, pri antikvaj dokumentoj de katalunaj hebreoj, skribitaj en kataluna lingvo per hebreaj literoj, pri katalogo de manuskriptoj de la Biblioteko, kaj aliaj.

DEKDUA UNIVERSALA KONGRESO, HAGO 1920.--Kajero tridek-unua de la Esperantista Dokumentaro eldonata de la Centra Oficejo. Ĝi enhavas la preparajn dokumentojn kaj komunikojn, nomaron de la Honora Komitato, raporton de la prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, proponojn ricevitajn, raportojn pri la kunveno de la Lingva Komitato kaj pri ĝeneralaj kunsidoj de la Kongreso, Paroladon de la Kongresa Prezidanto, alprenitajn decidojn, liston de la kongresanoj, raportadon pri kunvenoj de specialistoj kaj pri festoj kaj ekskursoj.

ESPERANTO. DIE GRAMMATIK VON DR. ZAMENHOF MIT ERLAUTERUNGEN, de Prof. P. Christaller. Eldonis: Verlag von Wilhelm Violet, el Stuttgart. En lingvoj germana kaj Esperanto enhavas tiu ĉi libro la grammatikon de D-ro Zamenhof, kun komentario. La aŭtoro klarigas kelkajn malfacilajn demandojn per tre konciza maniero.

ORIENTO.—Libro bele eldonita de «Liceu Dalmau», dediĉata al la kultura kaj profesia edukado de la virino. Ĝi enhavas ĉarmajn kaj interesajn leterojn kaj malgrandajn artikolojn pri la virina vivo, verkitajn en diversaj lingvoj. Ĉe «Liceu Dalmau» (Valencia, 245, Barcelona) oni instruas Esperanton, ankaŭ per korespondado, kaj sur ĉiuj ĝiaj propagandaj presaĵoj oni vidas la nomon de nia lingvo meze de la lingvoj instruataj en tiu konata Liceo. Ĝia fondinto estas la klera instruisto kaj malnova samideano Delfi Dalmau.

LA PESTO EN MILANO DUM 1630.—Ĉapitroj XXXI^a-XXXII^a el «La Gefianĉoj» de A. Manzoni, tradukitaj de Dokt. Pier Carlo Monti. Kajero 24-paĝa el la Kolekto de la Revuo «L'Esperanto», eldonata de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) 1921. Historia studo pri la pesto inter la Milanaj loĝantoj, kun interesaj rakontoj pri la opinio de la popolamaso rilate la pestan malsanon kaj pri tiamaj okazintaĵoj. Tre ŝate oni legas tiun verkon enhavantan amason da historiaj sciigoj. La esperanta traduko estas pli ol rekomendinda, perfekta.

DIAGRAMO DE LA ESPERANTAJ KUNRILATAJ VORTOJ, elpensita de D-ro John W. Goetz, Avenida Rio Branco, 131, Rio de Janeiro. Verda stelo sur poŝtkarto, kies kvin pintoj signifitaj per I, Ki, Ti, Ĉi, Neni, turniĝantaj en rondo kun naŭ partoj signifitaj per a, u, o, es, e, am, al, el, om, montras la portugalan tradukon de la kunrilataj vortoj.

QUADERNS D'ESTUDI, n-ro 46. Kataluna gazeto por instruistoj, eldonata de «Consell de Pedagogia», Urgell, 187, Barcelona. Artikoloj pri Arĥeologio, Lingvistiko, popolaj dancoj, kaj aliaj.—J. G. C.

Oficiala Parto.

RUN kuraĝiga sukceso okazis la anoncitaj paroladoj de profesoroj S-roj A. Domènech, D. Dalmau kaj Josep Grau, kiel prepara kurso por la partoprenontoj en la ekzamenoj por profesoroj.

Nun ni esperas, ke la ekzamenoj okazontaj la 4.^{an} de la kurranta monato estos tiel same sukcesaj kaj kronos la sindoneman laboron de la paroladintoj, kiuj tiel kompetente disvolvis siajn temojn, liverante al la partoprenintoj atentindajn konsilojn por sukcese gvidi kursojn, fari la lernantojn fruktodonaj esperantistoj kaj profunde enradikigi la konon pri Esperanto.

Ni ricevis de federaciano S-ro A. Ferrer la jenajn kontraŭreformojn al la projekto de nova regularo prezentita de Esperanta Societo Paco kaj Amo:

Titolo; Katalunia Esperanta Federacio (K. E. F.)

Regulo 3-a. K. E. F. estos gvidata de Aganta komitato, kiu estos reelektebla po duono ĉiujare, formita el unu delegito aŭ reprezentanto de ĉiu esperanta societo, grupo aŭ sekcio federacianigintaj kaj ekzistantaj en la urbo-sidejo de la Federacio.

La membroj de ĉi tiu Aganta Komitato estos: ĝenerala sekretario, sekretario unua, sekretario dua, kasisto, kalkulisto, bibliotekisto kaj voĉdonantoj.

(La tria paragrafo taŭgas).

Regulo 5-a. Por plenumi pli bone la duan artikolon de tiu ĉi regularo, K. E. F. eldonos monatan oficialan organon, kies titolo estos «Katalunia Esperantisto» kaj ĝi ĉiam estos ekskluzive verkita en Esperanto.

Por la fakoj kaj propagandaj celoj inter la neesperantistoj, K. E. F. rajtas eldoni gazetojn k. t. p. verkitajn laŭbezone en kataluna aŭ kastila idiomoj, sed kondiĉe ke tiaj gazetoj estu aldonoj al la Oficiala Organo de K. E. F.

(La sekvantaj linioj de la projekto taŭgas).

Regulo 16-a. K. E. F. estos nur esperanta organizaĵo: pro tio ĝi estas tute neŭtrala rilate politikon, religion, socion, k. t. p., sed ne la fondotaj fakoj en K. E. F. laŭ regulo 11-a. de tiu ĉi Regularo.

Pro eraro en la manuskripto, kiun ni ricevis de Esp. Soc. «Paco kaj Amo», en la projekto presita sur nia lasta numero mankas la vorto «supèrflua», kiun oni bonvolu aldoni al la 3-a. regulo tria paragrafo, post la vorto «ostentació».

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO

ENLANDA MOVADO

RIPOLL. —Sinjorino Petra Domènech, ŝtata instruistino de publika lernejo por infaninoj, enkondukis la instruadon de Esperanto en sia lernejo antaŭ kvar monatoj, post ol ŝi tute sola memlernis nian lingvon. Areto da dek fervoraj lernantinoj sekvas la kurson gvidatan de S-ino Domènech kaj el ilia entuziasmo pri nia ideo oni povas konjekti ke ili estas esperiga semo por estonta grupo en Ripoll. Ni kore gratulas la profesorinon kaj la lernantinojn dezirante ke ilia rondeto rapide kresku.

SALT.—La 6^{an} de Aŭgusto, ĉe la Laborista Kultura Societo «Floreal», faris propagandan paroladon antaŭ amaso da ĉeestantoj nia kara amiko Conrad Domènech, el Girona. Pri la temo «Esperanto, lingvo internacia» la parolanto esprimis konvinkajn argumentojn, tre atente aŭskultatajn kaj entuziasme aplaudatajn je la fino de la parolado. Dum Oktobro komenciĝos nova kurso de Esperanto, gvidata de tiu sama laborema samideano.

BARCELONA.—La sidejo de ĉiuj Barcelonaj Grupoj kaj tiu de K. E. F. estis vizitata de la policianoj, laŭ ordono de la aŭtoritato. Ni supozas ke tia vizito efikis montri al la policianoj la facilecon de nia lingvo kaj la intensecon de la movado, post ilia atenta trarigardo de tiom da esperantaj presaĵoj, libroj, broŝuroj kaj gazetoj.

— La pasintan Julion, post longa kaj dolora malsano, mortis en Zaragoza nia juna amiko David Maynar, tre afabla kaj inteligenta esperantisto. Ni esprimas nian profundan kondolencon al lia familio, speciale al lia patro la konata pioniro aragona Manuel Maynar, kiu, vizitinte kun sia mortinta filo kelkajn katalunajn Kongresojn, havas inter la katalunaj samideanoj multnombrajn amikojn kaj ĝeneralan simpatian.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto	Nova Tempo
Le Monde Espérantiste	Literaturo
Esperanto-Praktiko	Portugal Comercial e Indus- trjal (Esperanta Fako)
Itala Esperantisto	The British Esperantist
La Marto	Nederlanda Esperanto
La Semisto	La Verda Ombro
Germana Esperantisto	Amerika Esperantisto
Hispana Esperantisto	Libero
Internacia Komerca Revuo	L'Esperanto
Esperantista Laboristo	La Revuo Orienta
Kristana Espero	El Esperanto
Verda Utopio	Brazila Esperantisto
Vegetarano	Oficiala Gazeto Esperantista
Espero Katolika	Ĉeĥoslovaka Movado
La Esperantisto	Nova Eŭropo
La Laborista Esperantisto	La XIII ^a
Esperanto	Agitanto
Hungara Esperantisto	Bizantio
Esperanto Triumfonta	

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Aleksandro Pilev, Fontanka 17, Petrogrado (Rusujo), deziras interŝangi il. pk. kaj leterojn.

S-ro Aleksandro Samojlov, Sbornaja 9^a, Simbirsk (Rusujo), deziras interŝanĝi p. k. kaj p. m.

Franca gazeto de leda industrio «Le Cuir» («La Ledo»), dezirante enkonduki en sia eksporta eldono «La Indekso de Ledaj Industrioj» fakon en Esperanto, petas ĉiujn esperantistojn interesiĝantajn al la leda komerco aŭ industrio, kiel teknikistojn, komercistojn aŭ oficistojn, sendi ilian adreson kun la indiko de la profesio al: S-ro Redaktoro de «Le Cuir», 54, rue de Bondy, Paris.

Internacia

Komerca

Revuo

Monata ilustrita revuo por la tutmonda komerco. Esperanto en la praktika vivo!

Mendu specimenan numeron kontraŭ duobla poŝtkarto (kun pagita respondo)! Jara abono Fr. sv. 7.-

«Internacia Komerca Revuo»,
Zürich (Svisujo) Centra Poŝtfako, 6104.

“L'ESPERANTO”

MONATA ILUSTRITA

INTERNACIA REVUO

sub patronado de

«ITALA KATEDRO DE ESPERANTO»

Abono : 15 lirojn

Adreso:

S. VITO AL TAGLIAMENTO

(Italujo)

Esperantistaj sigelmalkoj



Kolekto de 215, tre artaj kaj belaj, ĉiuj eldonitaj de mi. Prezo : 3 pesetoj afrankite.

Aliaj fremdaj esperantistaj sigelmalkoj pli ol 500 diversaj; neesperantistaj sigelmalkoj, memorigaj de ekspozicioj, konkursoj, k. t. p. pli ol 2000 diversaj; ĉiujn mi vendos en bonaj kondiĉoj.

Esperantistaj gazetoj

Kolekto de 50 - 100 aŭ - 150 diversaj titoloj; kolekto de 500 gazetoj en malmultaj titoloj sed en diversaj ekzempleraj; tre malalta prezo!



APRENEVE
L'ESPERANTO

JOAN AMADES

PEU DE LA CREU, 15, 1.^{er}, 2.^a

BARCELONA